

Al la vo Wolfgang Schwänzer

Adolf Burkhardt      *Por scio, kopie al K.H.Schaeffer, kiu ja*  
Gimpelweg 1            *supozeble submetas propran jarraporton*  
D-W-7315 Weilheim an der Teck [post 30 jun; D-73235]  
Tel. 07023-72413

Weilheim, 16. März 1993

*Laboroj por Germana Esperanto-Biblioteko Aalen*  
Raporto pri 1992

La amplekso de GEB denove konsiderinde kreskis, precipe pro sistema akirado de titoloj ĝis nun mankintaj, per aĉetoj helpe de la buĝeto, kaj, malpli ol pli frue, per interaŝanĝo kun similaj bibliotekoj. Krome alvenis pluraj tre gravaj donacoj (heredaĵoj), kvankam por kreskigi la nombron de novaj titoloj ili ne plu estas tiel gravaj kiel pli frue; tamen ili forte kontribuas al plikompletigo per duaj ekzempleroj, kiujn ni ruĝe markas (kontraste al la nigraj etiketoj por unikaĵoj). Ni ja strebas estonte plenumi prunto-dezirojn unualoke per duaj ekzempleroj (tiun aspekton ni ne atentis dum la konstrua fazo de la unuaj jaroj).

La komunikado inter Aalen kaj Weilheim estas senproblema. Preskaŭ regule mi havas telefonan kontakton, ĉefe kun Karl Heinz Schaeffer merkrede, kiam li kun la teamo laboras en la Biblioteko mem. Transportojn ĝis nun faris mia filo Georg, dum li studis en la Faka Altelernejo en Aalen. Tio ja nun estas finita - hodiaŭ li lastan fojon transportas ses kestojn kun preta materialo (gazetoj kaj libroj biblioteko prilaboritaj de mi), ĉar hodiaŭ li transdonos sian diplomon disertacion al la profesoro kaj tiel formale finas la studojn. Tamen ni jam aranĝis, kiel plu certigi, ke provizore mi povu daŭrigi mian kunlaboron laŭ la ĝisnuna ritmo. Eĉ se materialo rekte alvenas en Aalen, ĝi unue iras al mi; mi kontrolas, ĉu ni bezonas proponatan materialon; se jes, mi registras, klasifikas, tajpas bibliotekan slipon, etikedas la erojn kaj metas en keston por, je oportuna okazo, sendi al Aalen. Nebezonatajn erojn mi kontrolas por eventuale meti en la bibliotekon de BAVELLO en Sigmaringen, poste en la bibliotekon de Munkeno, kaj, se temas pri kvino-blaĵo, ankaŭ en aliajn bibliotekojn laŭ la kontaktoj de Johann Pachter.

Laŭ mia poŝta libro, dum 1992 mi ricevis, priraktis kaj forsendis 840 leterojn, poŝtkartojn kaj pakaĵojn. Miajn poŝtajn elspezojn mi jarfine kompilas kaj sendas al Aalen por repago. Telefonadojn mi ordinare ne registris, do pagis private.

En la sama periodo, mi nove registris, laŭ mia "Zugangsliste", la bibliotekajn unuojn 9190 ĝis 9857, do 667 erojn. Tiu cifero ampleksas novajn librojn, broŝurojn kaj duajn ekzemplerojn de jam havataj titoloj, iafoje ankaŭ binditajn kompletajn jarkolektojn de periodaĵoj. Inter la nombre kaj kvalite gravaj kontribuoj elstaras tiuj de Anton Kronshage, Anton Gratzl, GEA-oficejo Richard Hirsch, sed plej grave Heinrich Nischwitz.

Honoro ne nur por la GEB, sed por la tuta Germana Esperantomovado estis la transdono al mi, je 19 marto 1992, de la Federa Merit-Ordeno, en ĉeesto de multaj personoj de la publika vivo. Unu rekta sekvo estis ke, sen mia peto, la lerneja dekano de mia distrikto (membro de la landa komitato por Evang. Kirchentag), kiu siatempe reprezentis mian eklezion de Württemberg, skribe subtenis la ĉeeston de Esperanto en la venonta Kirchentag en München per letero direktita al la centra prezidio, en kiu li



akcentis la gravecon de Esperanto.

Tre multan tempon mi uzis por reserĉi la detalojn kaj poste verki artikolon pri GEB aperonta ĉe Olms en "Handbuch der historischen Buchbestände in der Bundesrepublik Deutschland".

Temas pri tre ampleksa verko leksikon-formata, kies "Regionalband 'Baden-Württemberg'" nun estas prete redaktita. Mi citas el la koncerna letero (UB Freiburg): "Wir brauchen den Eintrag möglichst bald, weil die Aalener Esperanto-Bibliothek den ersten Eintrag des nach dem Ortsalphabet gegliederten Regionalteils Baden-Württemberg bilden wird."

La tuta verko havos 16 volumojn, Hildesheim 1991ss. Subskriptionspreis je Band DM 118.-, Ladenpreis je Band DM 148.-

Similan "Handbuch" en tri volumoj oni preparas pri Aŭstrio. Mi esperas, ke IEMW kunlaboros - sed mi timas, ke ili diros, ke neniu havas tempon por tiel ampleksaj serĉoj.

Alia tre grava evento por Esperanto-bibliotekoj estas, kvankam ni ne ludis rolon en tio, la apero de la paĝoj 3120 ĝis 3137 en leksikono "Wörterbücher/Dictionaries/Dictionnaires", Dritter Teilband. Berlin/New York: Walter de Gruyter. Temas pri la ĉapitro XXXVII. Lexikographie von Hilfssprachen und anderen Kommunikationssystemen. 329. Lexikographie der Plansprachen, tre kompetente verkita de Reinhard Haupenthal. La leona parto kompreneble traktas Esperanton (mi povis atentigi la aŭtoron pri du titoloj, kiujn li pretervidis).

[Du postnotoj, ekster la raporto:]

a) Esperanto Aktuell ja detale raportis pri biblioteka laboro lige kun Bundesverdienstkreuz. Tamen mi konstatas, denove, ke en la pensoj de GEA evidente GEB apenaŭ ludas rolon: Tre laŭdinde la eldonoj en ambaŭ lingvoj regule ripetas la adresojn de funkciuloj inkluzive de komisiitoj pri specialaj taskoj - Zairio, prelegvojaĝoj - sed pri GEB eĉ telefonnumeron oni ne trovis dum la tuta jaro, por tute silenti pri plena adreso - kvankam estus utile indiki tiun de Aalen por la uzantoj kaj la mian por ofertoj pri heredaĵoj kaj simile, por eviti superflujajn transsendojn inter Aalen kaj Weilheim..

b) Iom pliboniĝis la subteno, kiun mi ĝuas de GEA-instancoj rilate al la ĝisdatigo de periodaĵoj - kio estis mia plendo-punkto de la unua horo, kaj, almenaŭ parte, restis ĝis la nuna momento: En persona konversacio dum seminario en novembro pasintjara, unu el la redaktoroj konfesis al mi, ke neniu instrukiis lin, kiam li transprenis la laboron, pri tio ke la alvenantaj interŝanĝaj ekzempleroj de la Esperanto-gazetaro apartenas al GEA, do li nek konservis nek transdonis ion al GEB. Mi devas konfesi, ke tiu ĉagrena situacio pli ol unufoje pelis min al la rando de malespero kaj estis la unua kaŭzo, kial mi antaŭ jaroj formale demetis mian funkcion por GEB kaj nur provizore konsentis plu labori - la formulo, sub kiu mi ja ĝis nun plu okupas min pri libroj kaj gazetoj. La truoj kaŭzitaj pro neglekto en la 50-aj jaroj kaj, denove, sub redaktoro post Willkommen (en la momento mi forgesas la nomon) estas apenaŭ plene ripareblaj, kvankam ili kostis al mi amason da leteroj kaj poŝtkartoj kun responde kvanto da tempo kaj energio, eĉ ne menciante la monon elspezitan. Vivu la espero!